

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Ĥalilov Timur
[Ekaterinburg, Rusio]

Vintra sonĝo

2003

Kiel Derk Ederveen, kompilanto de "Pasporta Servo", iĝis komencanto bondeziroj al la legantoj de "Komencanto" el la tuta mondo — la tria periodo de esperanta literaturo — literaturaj provoj de niaj legantoj gramatiko serioze kaj amuze — neelpensitaj historioj — aforismoj anekdotoj — diversaj — invitoj kaj informoj — korespondu!

1

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorská 1, CZ-696 62 Stržnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuressaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković,

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa


Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Rivero de la vivo fluas daŭre. Jen estas unua numero de la 2003-a jaro. Ni kore salutas niajn fidelajn malnovajn abonantojn kaj aparte — aligintajn novajn legantojn! Ĉiujn ni invitas ne nur resti legantoj, sed provi trovi la paĝon, rubrikon, en kiu vi povus utile kontribui per viaj provoj, diversgenraj kaj diversformaj. Do, ni invitas vin sur vojon de verkado kaj nia revuo dum la tuta jaro akompanos vin sur tiu ĉi vojo. La redakcio esperas, ke ĉi jaro cementos grandan amikecon inter ni kaj la legantoj kaj ni kune sukcesos atingi grandan kreaĵon etoson.



Redaktoro de "K" kun ĉefa ĉi-jara heroino sur la foto (farita dum vojaĝo en Britio) asertas, ke kaprino estas ĉarma estajo, kvankam foje obstina, sed eble tiu trajto helpas nin sur domoplana vojo de kreado!

KOMENCANTO

2002 numero 1 // (39) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2003:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.


Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K"
La sola kondiĉo - nepre menciigi KOMENCANTO'n,
la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokon.

Kiel tio komenciĝis

Derk Ederveen

Multjara kompilanto de PASPORTA SERVO — la plej populara kaj efektiva aktiveco de TEJO, administranto de la Adresaro de Rete Atingeblaj Esperantistoj kaj Esperanto-Organizoj
<dederveen2002@wxs.nl>; <<http://home.wxs.nl/~lide>>

... mi ĝojas ke mi povas aktivadi kiel kompilanto de Pasporta Servo.



En mezlernejo, en 1979, mi ne vere sciis kion elekti. Mi ŝatis lingvojn, sed ankaŭ pli teknikajn fakojn kiel fiziko kaj matematiko. Tial mi eniris gimnazion, kio ebligis lerni ne nur teknikon kaj la francan kaj la germanan, sed ankaŭ latinan kaj grekan. Fascinaj lingvoj, kiuj neniel similis al tiuj kiujn mi konis. Speciale la greka estis interesa, kun alia alfabeto, kaj multaj vortoj kiuj tra miloj da jaroj postvivis en fora lingvo kiel la nederlanda.

Tamen pli kaj pli montriĝis, ke mi estas nek "lingvulo", nek "teknikulo". Fiziko kaj matematiko ne iris malbone, sed kemio montriĝis multe pli malfacila. Same pri la lingvoj. La angla kaj la franca facile enkapiĝis, sed la germana, kun la multaj kazoj, estis kvazaŭ nesuperebla monto. Kaj malgraŭ mia entuziasmo ankaŭ la latina, kaj eĉ pli la greka, estis lingvoj kiujn mi ne sukcesis bone majstri.

Sed la instruisto pri la greka estis tre afabla kaj pacienca. Foje li provis instrui al ni speciale malfacilan gramatikajon. Li vidis niajn malesperajn mienojn, kaj subite decidis montri alimaniere. Li prenis ekzemplon el lingvo tute nekonata al ni. Li diris ke tiu lingvo estas *tute regula*, kaj ke li lernis ĝin en *unu semajno*, kiam li havis rompitan kruron. Li ankaŭ diris la nomon de tiu lingvo: Esperanto. Per tiu facila kaj tute regula ekzemplo li provis

montri al ni la strukturon kaj la esceptojn en la greka. Sed mi jam ne aŭdis plu. Mi memoris la nomon de tiu lingvo, kaj decidis lerni ĝin. Se li povis fari tion dum unu semajno, eble mi povus fari en unu aŭ du monatoj. Eble tiel mi pli facile lernos aliajn lingvojn. Kaj se ne, mi ĉiam havos almenaŭ unu kroman lingvon kiun mi regos.

Post kelka tempo estos mia naskiĝtago. Mi metis lernolibron kaj vortaron pri Esperanto sur mia naskiĝtaga dezirolisto. Kaj je mia granda surprizo mi ricevis ilin de mia onklo! Montriĝis ke li antaŭ multaj jaroj mem lernis la lingvon. Intertempe li tute forgesis ĝin, sed li elfosis kelkajn librojn, kaj vizitis la Esperanto-klubon en sia urbo Nijmegen por aĉeti vortaron. Tiujn li donacis al mi, kune kun la adreso de la klubo. Kaj mia avo memoris iaman kolegon en la lernejo, kiu tiam estis tre fervora Esperantisto. Tiu s-ro Manders eĉ verkis vaste uzatan Esperanto-lernolibron por nederlandanoj, kaj intertempe ekloĝis en nia urbo Venray.

Ĉiumatene mi studis Esperanton per memstuda kurso kiun mi pruntis. Malmultis tempo: de la sesa ĝis la sepa mi perlaboris poŝmonon per distribuado de ĵurnaloj, de la sepa ĝis la oka mi okupiĝis pri Esperanto (kune kun la Radio Varsovio), duonhoro estis por matenmanĝo kaj ceteraj preparoj, kaj ek al la lernejo. Speciale malfacile estis se mi havis la francan dum la unua horo, ĉar mi ne sukcesis elbuŝigi la francan post unu horo da Esperanto. La lingvoj tro similis por mi.

Mi deziris ekzerci per tradukado, kaj prenis libron "Pieter Bas" de Godfried Bomans kiun mi tre ŝatis. Ĉiusemajne mi vizitis s-ron Manders, kun kiu mi babilis kaj ekzercis, kaj kiu kontrolis mian tradukon. Mi ankaŭ vizitis la monatajn klubvesperojn en Nijmegen, kie oni kore bonvenigis 15-jaran novan membron. Post nelonge venis la unua junulara kunveno en Nederlando, kaj la unua eksterlanda kunveneto (tendaro en Burschied). Kia grandega ĝojo malkovri ke tiu lingvo

vere *funkcias* inter eksterlandanoj. Ĉu vi jam sonĝis en Esperanto?

Sekvis multegaj Esperanto-aktivecoj, renkontiĝoj kaj amikoj. Tre aktiva junulara klubo en Nijmegen, kun kursoj dum pluraj jaroj. La UK* en Antwerpen, kaj poste la IJK** en Leuven. Sekvis multaj aliaj. Aktivado en Nederlanda Esperanto-Junularo, kun la IJK 1989 en Kerkrade kiel granda kulmino. En la komenco de la 90-aj jaroj Internet kaj retroŝto ebligis starigi korespondan kurson per retroŝto. Publikigo de la traduko de Pieter Bas. Per Esperanto mi konatiĝis kun mia amikino Lilian.

Nun mi laboras kiel teknika verkisto, kaj tiel trovis mian lokon precize inter lingvoj kaj tekniko. Sed dum pliserioziĝis la profesia laboro, malmultiĝis tempo kaj energio por Esperanto. La lasta renkontiĝo estis antaŭ pluraj jaroj. Sed mi ĝojas ke mi povas aktivadi kiel kompilanto de Pasporta Servo. Estas plezuro ĉiujare kunmeti libron kiun centoj da homoj atendegas. Kaj kompreneble ni de tempo al tempo havas gastejojn per Pasporta Servo.


*UK — Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio.

**IJK — Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo



Bondeziroj el la tuta mondo al vi, karaj niaj

Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]



Renato Corsetti

Prezidanto de UEA [Palestrina, Italio — Rotterdam, Nederlando]

Komenco bona, laboro duona

La Proverbaro en Esperanto havas la proverbon "Komenco bona, laboro duona". Ĝi estas adapto de proverbo similspeca konata en ĉiuj lingvoj. Tio montras, kiom gravas la komenco de aferoj. Eble pro tio esperantistoj ĉiam donis grandan atenton al la tiel nomataj "komencantoj", tio estas al la novaj esperantistoj.

Mi aŭdis foje, ke la problemo de Esperanto estas ĝuste la manko de multaj komencantoj. Fakte nuntempe ni havas multajn, ĉefe retajn komencantojn, sed ni vivus tre pli bone se la komencantoj dekobligus. Pro tio ĉio, kio iel helpas komencantojn, estas prioritato por la Esperanto-movado. Iusence vi, legantoj de ĉi tiu gazeto, apartenas al la elito de la movado, al tiuj homoj, por kiuj la movado estas preta fari plie. Vi vidus, ke kiam vi estos instruistoj kaj ne komencantoj la vivo estos malpli facilaj.

Ĉiukaze ne lasu min prediki pli longe, ĉar mia prediko povus iĝi ege teda kaj iĝi malplaĉa la plaĉan okazon, pro kiu mi nun skribas al vi, tio estas la nova jaro. Ankaŭ la nova jaro estas komencanto. Ni vetu, ĉu li aŭ vi iĝos pli sperta pli rapide

Bonan novan 2003-an jaron!

Renato Corsetti, prezidanto de UEA

Trevor Steele

Ĝenerala Direktoro de UEA,
[Rotterdamo, Nederlando]

Karaj esperantistoj, nia lukto apenaŭ ŝajnas pli proksima al sukceso, ol ĝi aspektis antaŭ cent jaroj. Sed ni ne forgesu la pozitivajn: ke ja ekzistas tutmonde uzata neŭtrala lingvo kun priferinda literaturo, ke la vorto Esperanto estas konata al milionoj da homoj. Foje oni rigardas nian aferon nobla sed "utopia"; nu, la utopiistoj de hodiaŭ estos la realistoj de morgaŭ!

Trevor Steele
Ĝenerala direktoro de la
Centra Oficejo de UEA

legantoj de "Komencanto"

Kep Enderby

Prezidanto de UEA — 1998-2001
Aŭstralio

Karaj legantoj de Komencanto! El mia fora lando Aŭstralio, lasu min ĝoje sendi novjarajn salutojn kaj gratulojn al vi. Ni travivas interesan kvankam, bedaŭrinde, danĝeran epokon. Gvidate de la principoj de Esperantismo ni preterpasos ĝin. Amike salutas ĉiujn!

Kep Enderby

Stano Marček

redaktoro de la revuo "Esperanto", ĉeforgano de UEA, Slovakio

Mi deziras al la legantoj de Komencanto, ke ili fariĝu bonaj scenaristoj, reĝisoroj kaj kameraistoj, sukcesaj aktoroj kaj atentemaj spektantoj de la preparata interaktiva 3D-filmo LA JARO 2003!

Stano Marček

Andrej Grigorjevskij,

Estrarano de UEA, Rusio

Karaj legantoj de "Komencanto"! Vi estas la plej belaj, ĉar vi estas la plej bonaj, vi estas la plej bonaj, ĉar vi estas la plej saĝaj, vi estas la plej saĝaj, ĉar vi estas la plej lernemaj, vi estas la plej lernemaj, ĉar vi abonas kaj atente legas "Komencanto"-n! Tial al mi nur restas al vi deziri, ke tiom bonaj kaj agrablaj homoj nepre estu feliĉaj en la nova jaro!

Andrej Grigorjevskij

Fabricio Valle

redaktoro de "Brazila Esperantisto"

El la tropika Brazilo mi deziras al la legantaro de la vere interesa kaj utila revuo "Komencanto" bonegajn tagojn dum la nova jaro, plenajn je bonaj legaĵoj kaj ĝojo kaj ĝuo. Ke ni ĉiuj per Esperanto helpu en la konstruado de nova mondo.

Fabricio Valle

Georgij Kokolija

redaktoro de "Rusia Esperanto-Gazeto", Rusio

Karaj komencantoj kaj aliaj "Komencanto"-legantoj!

Bonvolu akcepti miajn la plej sincerajn gratulojn! Mi deziras al vi en la jaro 2003 fariĝi kun helpo de la revuo aktivaj posedantoj kaj uzantoj de la lingvo Esperanto! Mi esperas vian helpon en la plifortigo de nia rusia E-movado!

Garik Kokolija.

Jose Roberto Tenorjo

redaktoro de revuo "La Lampiro"
San-Paulo, Brazilo

Kudras per vortoj homajn rilatojn
Originale fluas skribado
Masonas amikecon transmaramon
Entreprene spitas la movadon
Nutras arte la lingvon homaran
Cirkulas herolde tra la mondo
Amuzas, spritas ĝia enhavo —
Ni tostu al l' aŭtoroj, en rondo,
Trezor' nin kondukanta al ravo!
Okcidentan' kunĝuas ĉi faktojn...

Tenorjo

Geza Kurucz

redaktoro de revuo "Juna Amiko",
Hungario

Mi elkore gratulas al la redaktoro de "Komencanto" pro lia energio kaj persistemo, pro la varia lingva materialo de la interesa periodaĵo. Mi deziras al vi daŭre multajn aktivajn legantojn kaj esperas, ke la plej fidelaj el ili fariĝos veraj esperantistoj, kiuj pluportos nian verdan standardon. Multajn sukcesojn deziras Geza Kurucz, la redaktoro de la frata internacia revuo de ILEI, "Juna Amiko".

Geza Kurucz

Christian Lavarenne

redaktoro de
"Le monde de l'espéranto",
Francio

Karaj komencantoj kaj legantoj de "Komencanto"!

Mi deziresprimas al vi multajn novajn komencojn dum la komenciĝanta [aŭ: jus komencita] jaro.

Sen resti "eternaj (Esperanto-) komencantoj", neniam ĉesu komenci: la lernantoj komencu korespondi kun ali-landaj samideanoj, la korespondantoj komencu amikiĝi, la amikoj komencu provi renkontiĝi, ekzemple partoprenante en komunaj Esperanto-arangoj aŭ kongresoj...

La skribemuloj komencu provi verki artikolojn, komencu montri ilin al pli spertaj esperantistoj, komencu ilin sendi al taŭgaj gazetoj, aŭ eĉ komencu fariĝi regulaj kontribuantoj. Mi mem komencis antaŭ malpli ol du jaroj esti dungita redaktoro de "Le monde de l'espéranto"!

La verkemuloj komencu siajn unuajn poemojn, novelojn aŭ teatraĵetojn, kaj aŭdacu komenci sendi ilin al siaj korespondantoj aŭ ilin prezenti al siaj samklubanoj. La poetoj provu publikiĝi siajn verkojn, ekzemple en "Komencanto"; la novelistoj komencu romaneton...

Sed ĉefe, sen plua atendo, komencu fariĝi feliĉaj:

Feliĉo ne estas en grandaj atingoj kaj gloro, aŭ ne nur!

Sed ankaŭ en etaj komencoj per kiuj ja paŝo post paŝo

La cel' atingiĝas ...kaj baldaŭ alia montriĝas, senfine!

Feliĉu dank'al Esperanto — kaj ne nur...! Dum jaroj kaj jaroj!

Amike al ĉiuj Christian

La tria periodo de esperanta literaturo *La skota skolo*

Karaj legantoj! Tiu ĉi literatur-historia rubriko iĝis tradicia en nia "Komencanto". Ĝia apero sekvis el la konvinko, ke ĉiu esperantisto, des pli tiu, kiu provas mem verki ion, interesiĝas pri historio de Esperanta literaturo, pri ĝiaj famaj verkistoj — ilia vivo kaj kreado. Ni ricevis multajn pozitivajn reejojn kaj petojn daŭrigi tiun rubrikon. Tute ne pretendante prezenti plenan kaj elĉerpan informon koncerne Esperanto — aŭtorojn kaj iliajn verkojn, ni nur celas direkti vin, karaj legantoj, en senlima literatura "ocean" kaj veki ĉe vi strebon pli profundigi en ĝin, trovi, tralegi kaj ĝui multajn eminentajn verkojn. Ni esperas, ke ĉi-tio helpos al vi malkovri por si eblojn de memsprimo kaj posedi la arton de literaturkreado. Ĉi-jare ni planas priumi la trian literatur-historian periodon.

La tria literatur-historia periodo, kiu sekvis post la dua mondmilito kaj dum-milita inerto, alportis ree grandan disfloradon de Esperanta literaturo. En tiu literatura florado partoprenis reviviĝinta Budapeŝta skolo (abunde verkis en tiu-ĉi periodo Julio Baghy kaj K. Kalocsay, Lajos Tarkony kaj F. Szilágyi), la fama skota skolo (W. Auld, J. Dinwoodie, R. Rossetti, J. Francis) kaj multaj aliaj britaj, bulgaraj, brazilaj, germanaj, ĉeĥoslovakaj, francaj, jugoslavaj k.t.p. aŭtoroj. Tre signifaj ĉi-periode estis revuoj kiel "Literatura Mondo", "La Nica Literatura Revuo", "Norda Prismo", "Suda Stelo", "Monda Kulturo", "Hungara vivo", "El Popola Ĉinio", k.t.p. Vigliĝis ankaŭ libroeldonado: multaj klasikaj verkoj reaperis en la dua eldono kaj grandnombre eldoniĝis novaj verkoj.

Prezenton de verkistoj de tiu-ĉi periodo ni komencas de skotaj aŭtoroj. Oni eĉ apartigas tiel nomatan skotan skolon, kiu grupiĝis ĉirkaŭ la gazeto "Esperanto en Skotlando", redaktata tiam de William Auld. El la skolo precipe famiĝis kvar aŭtoroj: William Auld, John Sharp Dinwoodie, John Islay Francis kaj Reto Rossetti. Ili prezentis sin kune en la poemvolumo "Kvaropo". La unua eldono de tiu ĉi poemlibro aperis en 1952 kiel debutvolumo de la poste famiĝinta eldono "Stafeto" sur la Kanariaj Insuloj.

Ĉiuj el "kvaropanoj" havis forte distingitan poetan individuon. Jen kiel karakterizas tion Vilmos Benczik: "... Auld verve senpacienca, li estas etike agordita; Francis estas skeletrigore intelekta estaĵo; Dinwoodie ĉefe meditema, melankolia; Rossetti bohema, iom leĝera. Por Auld la poezio antaŭ ĉio servas kiel ilo por efike komuniki siajn pensojn al la homoj, unuavice pri la socio; por Francis same, kun la diferenco, ke lia interesiĝo estas pli abstrakta, pli filozofia, ol tiu de Auld; Dinwoodie kultivas ĉefe la pure personan lirikon, kun etika saturiteco; dum Rossetti klare inklinas al hedonismo... Multas la diferencoj. Malhelpis la formiĝon de vera skolo ankaŭ la fakto, ke inter la aŭtoroj de "Kvaropo" ne troviĝis tia majstro, kia estis Kaloczay por la aŭtoroj de la Budapeŝta skolo. Mankis centra aŭtoritato, mankis suno: Auld, Dinwoodie, Francis kaj Rossetti estis nur kvar planedoj kiuj foje renkontiĝis — sendube, en grava momento

V. Benczik — konata kritikisto, kaj ekde 1977 ĉefredaktoro de "Hungara vivo"

kaj tiu renkontiĝo nepre estis fruktodona — sed ĉiu el ili havis sian propran orbiton..."

Vere, malsameco de la aŭtoroj pli abundis, sed la ĉefa komuneco estis en tio, ke ili ĉiuj, edukitaj per unu el la plej intelektaj poezioj — per la angla poezio — strebis kunigi la atingojn kaj tradiciojn de tiu ĉi poezio, kun ĉiuj ĝistiamaj valoroj de la esperanta literatura tradicio.

Poemlibron "Kvaropo" malfermas "Manifesta balado". Tiu verko — dediĉo literature demonstras la ŝanĝiĝon de epokoj. Denove ni citas V. Benczik, kiu skribis: "La kvar poetoj omaĝe defilas antaŭ Kaloczay, dankante lin pro la "lum-investo", samtempe informante la leganton pri eko de nova literatura skolo — la skota skolo".

Sube ni proponas al via atento kaj tralego la fragmenton el la "Manifesta balado" kaj pli detale prezentos al vi ĝian aŭtoron, unun el "kvaropanoj" — Reto Rossetti.

Manifesta balado

AMIKOJ, el la pigra ŝlimo,
Kiu saturas nian veston
Kaj volas rampi ĝis animo,
Ni jam laŭtigu la proteston!
Forlasu ni la kotan neston
Kaj levu nin en sankta bolo,
Por fari vervan manifeston
Sub flago de la skota skolo!

Sufiĉas jam ke ni en timo
Tenebre fermas nin en keston
Kaj kaŭras sub malvasta limo,
Kovante povre la modeston.
Ni tamen finu la sieston
Per energia kapriolo,
Kaj faru ni patosan geston:
La blago de la skota skolo!

...
Ne plu ni estu nura cimo
Suĉanta sange la majeston:
Ni donu! por ke, en pilgrimo
Ironte eble Budapeŝton,
Ni povu levi nian kreston
Sen honto antaŭ la Apolo;
Ĉar dankas lian lum-investon
La pago de la skota skolo!

Princo madjaro! Se l' digeston
Ni bone faris pri l' medolo,
Do eble garnos jam ueston
La tago de la skota skolo!

Reto Rossetti estas svisdevena brito, profesoro de artpedagogio. Li naskiĝis en 1909 en Skotlando; esperantistiĝis en 1928; profesie laboris kiel ĉefo de artinstruista seminario en Britio. En portreto pri Reto Rossetti W. Auld skribis, ke li estis "la vera patro de la skota skolo". Siatempe Reto ricevis leteron de eldonisto Juan Régulo Pérez, kie Juan sciigis pri sia intenco starigi eldonejon. En la respondo Reto menciis pri poemoj de kvar skotaj aŭtoroj. Poste ili interkonsentis pri la eldono de tiuj poemoj unuvolume sub titolo "Kvaropo".

Estas konate, ke Rossetti multe influis W. Auld kaj aliaj du kvaropanoj. Jen kiel rakontis pri tio W. Auld mem: "... ni pasigis kune multajn semajnfinojn, babillante dum tutaj noktoj... Per tiuj babiloj kaj noktaj deklamoj ni adsorbis la Esperantan kulturon".

R. Rossetti komencis verki en 1930 kaj ekde 1935 li estis kunlaboranto de "Literatura Mondo", kie lia aktiveco vere iĝis rimarkinda en la jaroj 1947-1949, kiam sur paĝoj de la revuo aperis 11 kontribuajtoj el lia plumo. Li ankaŭ kunlaboris en la revuo "La Nica Literatura Revuo", kaj en 1954-55 redaktis "Esperanto" de UEA. Krome R. Rossetti estis iniciatoro kaj plujara sekretario de la "Belartaj konkursoj".

Poetika sinteno de Reto Rossetti devenas el lia "artista karaktero". "... Por li la poezio ne estas ilo por alfronti la mondon aŭ sondi la profundojn de la propra animo — sed antaŭ ĉio ludo kaj fonto de belo kaj ĝuoj. Ne temas ĉe li pri spirhaltiga belo kaj nek pri ĝuo, tremiganta la animon. Li serĉas belon, kiu lude nur tiklas la sensojn, evitante intense profundecon", — skribis V. Benczik.

Ne hazarde kiel moton por sia poemokolekto "Oazo", kiu aperis en volumo "Kvaropo" (1952), Rossetti prenis sekvajn poeziajn liniojn de K. Kaloczay: "Ho, ludo, dolĉa ludo, vi saĝo de sensenco, oaz' de freŝaj fontoj, malgranda paradizo..."

La temaro de poemoj en "Oazo" estas tre vasta: atento al socio kaj al la sociaj maljustaĵoj (en "Balado"); malespero de homo, kiu ekveas: "Se mi nur havus celon... Se nur mi povus kredi ian celon: eĉ trompan, nur la trompon mi ne vidu..." (en poemo "En abismo"); filozofia

medito (en poemo "Tamen"); plendo pro la soleco, pro la indiferento de homoj (en poemo "Fluktuo"), kiun trafe fermas adoptita Zamenhova proverbo: "Najbar' ne ĝemas, kiam la boto nin ekpremas"; amo al virino (en "Amofebro") kaj aliaj.

Post la poemkolekto "Oazo" aperis de R. Rossetti la poemoj de la volumeto "Pinta Krajono" (1959). Ĝi enhavis "Jubilean Eposon" — koncizan kaj tre vivan verskronikon de Esperanto ĝis la Bulonja kongreso, parodiojn laŭ esperantistoj-poetoj, la ciklon "Mestizo de l' Mondo", kiu prezentis la homon en kurba spegulo kaj montris relativecon de nia imago pri beleco,

La proziston Rossetti prezentas la libro "El la Maniko" (1955). En ĝi montriĝas lia flua kaj leĝera stilo, plastika karakteriza kapablo, rekta kaj trafa esprimmaniero (en la noveloj "Francisko la fuŝulo", "Krutajo" k.t.p.); delikatas facila aluda erotiko en novelo "Banu vin, mia bela". Lian spritan eksperimenton kaj trovemon pravas liaj lingvaj ŝercoj: lia studo pri vortludoj kaj la "Neologismologio". Sub titolo "Spegulo de Esperantaj stiloj" en 1976 estis eldonita volumeto de verkisto, kiu enhavis liajn 16 artikolojn, kiuj pli frue aperis en revuo "Heroldo de Esperanto".

Rossetti redaktoris la prozan parton de la Angla Antologio (1957) kaj brile tradukis por ĝi kelkajn poemojn. Liaj eminentaj Shaekespeare-tradukoj: fragmentoj el "Roméo kaj Julieta" kaj el "Julio Cezaro", la tuta "Otelo" (1961) — alte elstaras per la esprimriĉo, vigla kaj natura lingvo, scenadoptitaj dialogoj.

En ĉiuj supremenciitaj sferoj de literatura kreado: poezio, prozo, eseoj, en tradukarto — ni malkovras por si la multkoloran kaj neordinaran talenton de Reto Rossetti, lian perfektan majstrecon super la lingvo. Bonvolu tralegi ĉi-subajn fragmentojn el liaj verkoj kaj juĝu mem, karaj legantoj!

Reto Rossetti

La krutaĵo

(fragmentoj)

...Fergo, la traktoristo, diris al sia helpanto: "Rolfo, ĉu vi volas resti ĉe la segado kun Barto?" Kaj al mi: "Vi povos veni kun mi ĉi fojon, Toĉjo, se vi deziras".

Tre volonte mi akceptis... Kaj Fergo konfidis al mi, per tiu sama, mole ĝentila voĉo: "Mi prefere vin havas kun mi, Toĉjo, ĉar tiu Rolfo tro impetas kaj ĵetas tro impulse sian finon de la ŝtipo dum la malŝarĝo. Sciu, tio povas danĝeri al la kunulo. Lastan fojon li ĵetis tiele dum mi ankoraŭ portis la ŝtipon. Mi tuj ekĵetis mian finon, sed pro la nesamtempa ellaso la ŝtipo resaltis alte ĉe mia flanko kaj preskaŭ forportis mian kapon.

— "Li paradas per sia forto" — mi diris. — "Li amas spektakli. Tre kruda li estas".

— "Jes, li estas bona junulo, sed iom tro fervora. Li ne komprenas", — rediris Fergo indulge.

— "Mi admiras de senpasion de viaj paroloj" — mi diris. Se iu mian kapon estus danĝerinta per sia malcerto, mi ja trovus pli fortan vorton ol "fervora" por priskribi lin! Natura ĝentilhomo vi estas, Fergo! Kaj grandan estimon pro tio vi havas ĉe la laboristoj".

... — "Ĉu vi scias, ke iam mi havis tre flamiĝeman temperamenton? Tio estis antaŭ longe, kiam mi estis ankoraŭ junulo".

... — "Mia frato Adamo kaj mi estis atletaj, sportamaj knaboj. Ni grimpis la montojn, ni kuris, saltis, boksas. Unu vesperon ni vestis la boksgantojn por amika skermo. Ni ambaŭ estis lertaj kaj vigele vetemaj. Kaj ni konis kaj fervore praktikis la boksteknikon; mi manovris, evitis, ekbatis: piŝtobato, arkobato, kaj tiel plu. Meze de la skermo Adamo fintis per la dekstra kaj per la mala trafis en mian makzelon. Mi ekflamis kiel rezina ligno kaj blindekolere rebatis, draŝante dupugne kaj vanigante lian arton per la furiozo de mia atako. Adamo rezigne faligis la manojn. Mi, malatentante lian batalhalton, piŝtis en lian vizaĝon. Sur lia vangosto aperis malhela kontuzo. La okuloj de Adamo flagris kaj kun kolera malestimo li sin forturnis de mi, deŝiris de siaj manoj la boksgantojn kaj foriris.

La tutan vesperon ni ne kunparolis. Same malpace ni iris dormi.

Matene Adamo levigis frue kaj eliris por fari grimpadon sur la roko de tiu krutaĵo. Dek futojn de la supro li falis — kiakaŭze mi ne scias. Lian frakasitan korpon trovis paŝtisto, kiu alarmis nin. Mi iris kun mia patro al la loko. Tie kuŝis Adamo, kaj tie sur lia morta vango ankoraŭ sidis la kontuzo, kiun mi donis al li la antaŭan vesperon."

Fergo turnis al mi milde malĝojan rigardon kaj diris reve, kun sincer-naiva tono:

"Ĉu vi scias, Toĉjo? La vido de tiu malkulo tiel skuas min, ke de tiu tago mi neniam plu ekkoleris".

Subite mi sentis, ke mia bela poŝpleno da vortoj traglitas inter miaj fingroj kiel sablo. Silente mi enrampis en la traktoron...

El poemlibro "Kvaropo"
Reto Rossetti: "Oazo"

Fluktuo

Jen, baŭmas la spirit' aplombe,
jubilas, kuras, kun impeto;
jen ĝi silentas, kuŝas tombe,
kiel en sin' la morta feti.
Iam mi sentas min kometo,
iam, bolid' falinta rompe;
iam, mi sentas min poeto,
iam plumpul' maskita trompe.

Tamen neniu ja okupas,
ke la spirito en mi veas.
Se mi de temp' al tempo kreas,
sufiĉe! Kio min inkubas,
min tuŝas nur. Najbar' ne ĝemas,
kiam la boto min ekpremas.

Tamen

Kaj tamen estas bone se ni ĝemas.
Kiam la malespero sur l' animo
per sia tuta, drasta pezo premas:

ĉar, se silente cedas la viktimo,
la murda maso lian koron pistas
en la nenion — sed la ĝemesprimo,
eĉ de rezigna malesper', insistas
ke tamen io spitas, kvankam feble,
ke sube la vegeta vivo gistas.

La tuta rub' kovranta ĝin funebre,
ĉi vivon ne estingos en mallumo!
Ĝi volas vivi plu, nenkonkereble...
kaj fine sin tratiros al la suno.



Kononova
Snejana
[N.Omka, Rusio]

Karaj legantoj! Verŝajne multaj el vi scias, ke en februaro komenciĝas laŭ orienta kalendaro la jaro de Kaprino. Nia nova aŭtoro el Francio sendis sian debuton — tradukon de la rakonto de la fama franca klasikulo. Ĉefa heroino de la rakonto estas kaprino. Ni nur volas aldoni, ke franca verkisto A. Daudet dediĉis tiun ĉi verkon al sia amiko, lirika poeto, kiu dum la tuta vivo, ne dezirante cedi al malfacilaj vivaj cirkonstancoj ka j eĉ estante ofte en la tenojlo de la vivo, ĉiam elektis krear liberecon kaj verkadon laŭ la impeto de la animo. Nia kontribuanto Jean-Luc Tortel [Le Belvedere, Francio] tradukis la fragmenton de la verko sen antaŭ-kaj post-(historio mem) sinturno de A. Daudet al sia amiko.

Alfonso Daudet.

El la franca: **Jean-Luc Tortel**

[Le Belvedere, Francio]

La kaprino de Sinjoro Seguin



Vinnikova Nina [Barnaul, Rusio]

Sinjoro Seguin neniam feliĉis kun siaj kaprinoj. Ĉiujn li same perdadis: iun matenon ili rompintis sian ŝnuron, sur-iris la monton kaj tie supre ilin manĝegis la lupoj. Malhelpis nek la mastraj karesoj, nek la lupa timo. Laŭ-dire, la kaprinoj estis sendependaj, nepre ili postulis liberecon kaj vastan spacon.

La bona Sinjoro Seguin estis konsternita, sed komprenis nenion en la karaktero kaprina. Li ripetis:

— Tio estos senfina; la kaprinoj enuas apud mi, neniam mi sukcesos gardi eĉ unu. - Tamen li esperis plu; jam perdinte ses kaprinojn, li aĉetis la sepan; sed ĉi-foje li zorge elektis junetan, ke ĝi pli facile kutimu restadi apud li.

Ha! kiel beleta, la kaprineto de Sinjoro Seguin! kiel beleta kun siaj mildaj okuloj, sia sub-oficira barbeto, siaj nigre brilaj hufoj, striaj kornoj kaj mantelo el longa hararo blanka! Ĝi estis preskaŭ tiel ĉarma, kiel la kaprido de Esmeralda(*); kaj obeema, avida je karesoj, senmova dum la melkado por ne meti piedon en la laktujon. Nu, aminda trezoro estas tiu kaprino!

Post sia domo Sinjoro Seguin posedis paŝtejon, ĉirkaŭ-baritan de kratagoj. Tie li ligis sian novan gastinon al fosto, en la plej verda

herbo, zorge lasante la ŝnuron longa. De temp'al tempo li venis vidi, ĉu la kaprino komfortas. Ĝi tre felicis kaj tondis la herbon kun tia apetito, ke Sinjoro Seguin plene kontentis.

— Fine, - li kompatinda pensis, - jen estas kaprino, kiu ne enuas apud mi! — Sinjoro Seguin eraris: la kaprineto baldaŭ ekenuis.

Iun tagon ĝi sentis, rigardante la monton:

— Kiel devas esti agrable, ĉi-supre! Kia plezuro saltadi sur l'erikejo, sen tiu ŝnuraĉo kol-vundiga! Manĝi ene de barejo indas por azenoj, aŭ bovoj! sed la kaprinoj bezonas vastecon.

De tiam sengusta ŝajnis la herbo de l'paŝtejo. La kaprino enuis, ŝrumpis kaj melke sekis.

Kia vido kompatiga, tiu kaprino tiranta sian ŝnuron de mateno al vespero, levanta al la monto larĝajn naz-truojn kaj malgaje blekante: "- meee!"

Sinjoro Seguin sentis, ke lia kaprino mis-fartas, sed ne komprenis kial. Iun matenon, post la melkado, la kaprino turnis sin al li, dirante en sia dialekto:

— Aŭskultu, Sinjoro Seguin, mi enuas en via hejmo; lasu min al la monto.

— Ha! Dio mia! Ankoraŭ unu! - ekkriis Sinjoro Seguin, lasante fali la laktujon pro surprizo; kaj sidigante sin en la herbo apud la kaprino:

— Ĉu, Blankinjo, min forlasi vi volas?

— Jes, Sinjoro Seguin, - respondis Blankinjo.

— Ĉu la herbo mankas al vi ĉi tie?

— Ho! ne, Sinjoro Seguin.

— Eble tro streĉe vi estas ligita; ĉu mi longigu la ŝnuron?

— Ne utilas, Sinjoro Seguin.

— Do kio necesas al vi? Kion vi deziras?

— Foriri al la monto, Sinjoro Seguin.

— Sed, kompatinda, ĉu vi ne scias, ke sur la monto vivas la lupoj? kion vi faros antaŭ ĝi?

— Per miaj kornoj mi batos ĝin, Sinjoro Seguin.

— Pri viaj kornoj ja mokas la lupoj! Ĝi jam formangis de mi kornulinojn multe pli fortikajn. Ĉu vi memoras la kompatindan maljunan Grumblinon, kiu ĉi tie loĝis ankoraŭ last-jare? Majstra kaprino, fortika kaj sentima kiel virkapro. Ĝi bataladis la tutan nokton kontraŭ la lupoj, kiu matene ĝin manĝegis.

— Oj! kompatinda Grumblino! Tamen, Sinjoro Seguin, lasu min al la monto!

— Pro Dia graco! - diris Sinjoro Seguin: — Kian sorton oni ĵetis al miaj kaprinoj? jen ankoraŭ unu mangota de la lupoj. Sed ne; mi malgraŭe savos vin, fial Mi enfermos vin en kaprejon, ke vi ne rompu vian ŝnuron, kaj ne plu lasos vin eliri.

Tiam Sinjoro Seguin kondukis la kaprinon al tute sen-luma kaprejo, kies pordon li du-turne ŝlosis. Ve! li forgesis la fenestron; tuj poste, Blankinjo trans-saltis.

Kiam la blanka kaprino sur-venis la monton, ĝi ravis ĉiujn. Tiel beletan estulinon neniam ankoraŭ vidis la maljunaj pinoj. Oni renkontis ĝin kvazaŭ

(*)La juna ciganino Esmeralda dancis akompane de kapridino en la romano de V. Hugo "Nia Damo de Parizo", kaj en la opero de B. Smetana "La Vendita Fianĉino".

princidinon. La kaŝtan-arboj klinis sin ĝis tero por ĝin karesi per siaj branĉoj. La genistoj oraj ekfloris ĉe ĝia alproksimiĝo kaj bon-odoris kiel eble plej forte. La tuta logantaro monta ĝin festadis.

Kiel feliĉa estis la kaprineto! Nenia ŝnuro, nenia fosto plu. Libera ĝi laŭ-plaĉe kuradis; laŭvole manĝis amason da herbo, kiu kreskis ĝis super la kornoj; kaj kia herbo! kun gustoj variaj kaj delikataj el mil diferencaj plantoj kun dent-formaj randoj; frandoj tute aliaj ol la paŝteja herbo! Kaj la floroj! Grandaj bluaj kampanuloj, purpuraj digitaloj kun longaj fingroj, tuta maro da sovaĝaj floroj, spruciĝantaj kap-turnajn odorojn!

Duone ebria la blanka kaprino sin ruladis en la herbo, kun kruroj levitaj, ĝlitadis laŭ la deklivoj kune kun amasoj da falintaj folioj kaj kaŝtanoj; poste ĝi saltadis surpieden kaj ek! Ĝi kuradis kun kapo malalta tra la veproj kaj buksoj, jen sur pinton, jen en fundon de krutajo, supren, malsupren, ĉien, kvazaŭ dancus dek kaprinoj de Sinjoro Seguin sur la monto.

Nenion timis Blankinjo. Ĝi trans-saltis larĝajn mont-riverojn, kies ŝaŭmo kaj akveroj ŝprucis ĝin dum ĝia paso. Tiam, ĝuanta, ĝi etendis sin sur plata ŝtono por sekigi en la suno. Iam, alirinte krutan mont-randon, ĝi ekvidis malsupre, tre malsupre sur la ebena la dometon de Sinjoro Seguin kun ĝia posta herbejo. Blankinjo ekridis ĝis larmoj:

— Kiom malgranda estas tiol - ĝi diris, - kiel mi povis tie vivi?

Kompatinda! Ĉar ĝi staris en tia alto, ĝi kredis sin almenaŭ tiel granda, kiel la mondo.

Ja estis bela tago por la kaprino de Sinjoro Seguin. Tag-meze, dum zigzaga kuro, ĝi trafis cervo-aron, apetite maĉantan sovaĝajn vinberojn. La blank-roba kurantino furoris. Oni lasis al ĝi la plej konvenan manĝo-lokon kaj ĉiuj ĉi kavaliroj estis galante flirtemaj. Oni eĉ murmuris, sed tion vi ne ripetu, ke juna cervo kun nigra felo sukcesis plaĉi al Blankinjo. Ambaŭ geamantoj malaperis en la arbaron dum unu horo aŭ du; se vi volas scii, pri kio ili parolis, demandu la babilemajn rojojn fluantajn kaŝe sub la musko.

Subite la vento iĝis malvarma; la montoj iĝis violkoloraj. Vesperigis...

— Jam! - diris la kaprino kaj mire haltis.

Malsupre, la kampoj dronis en nebulon. La paŝtejo de Sinjoro Seguin malaperis; restis videbla nur la dometa tegmento, kun iom da fumo. Blankinjo aŭskultis la tintilojn de revenanta brutaro kaj sentis malgajon en l'animo. Falko, rehejmen flugante, per la flugilo tuŝis ĝin. Ĝi ekremis. Poste bruegis blekego en la monto:

— Hul hul!

Blankinjo subite ekpensis pri la lupo, pri kiu dum la tuta tago ĝi sen-prudente forgesis. Samtempe blovo-korno sonoris malsupre, tre fore; la bona Sinjoro Seguin estis faranta lastan klopodon.

— Hul hul! - hurlis la lupo.

— Revenul revenul! - respondis la blovo-korno.

Blankinjo emis reveni; sed memorante la foston, la ŝnuron, la kratagan barilon ĉirkaŭ la

paŝtejo, ĝi opiniis sin ne plu kapabla re-kutimi tian vivon: pli bone estis resti.

La blovo-korno jam ne sonoris. La kaprino aŭdis malantaŭ si bruon en folioj. Turninte sin, ĝi vidis en la ombro du mallongajn orelojn, tute rektajn, kaj du brilajn okulojn: la lupo.

Giganta, senmova, sidanta, ĝi rigardadis la blankan kaprineton antaŭ-frandante ĝin. Certa pri la preda kaptado, ĝi ne rapidis; kiam la eta sin turnis, ĝi senkompatate ridis:

— Ha! ha! La kaprineto de Sinjoro Seguin! — lekigante siajn lipegojn, tindre grizajn, per sia dika ruĝa lango.

Blankinjo sentis sin perdita. Memorante pri la maljuna Grumblino, batalinta la tutan nokton kaj matene formanĝita, ĝi pensis, ke eble pli bonus lasi sin tuj manĝegi. Sed ŝi ŝanĝis la opinion, kaj prenis defendan sintenon, kun kapo malalta kaj kornoj al-celitaj. Ĝi ne esperis mortigi la lupon; kaprinoj lupon ne mortigas; sed ĝi volis pruvi, ĉu ĝi rezistos tiom longe kiom Grumblino. Tiam la monstro alproksimiĝis, kaj la kornetoj ĝin atakis.

Ha! la kuraĝa kaprineto, kiel firme ĝi batalis! Sen-mensoge, pli ol dek fojojn ĝi devigis la lupon malantaŭen-iri por retrovi sian spiron. Dum tiuj unu-minutaj paŭzetoj, la frandema kaprino urĝe tondis erojn el la kara herbo kaj reiris al la batalo kun buŝo plena. Tio daŭris la tutan nokton. De tempo al tempo la kaprineto de Sinjoro Seguin rigardis danci la stelojn en la ĉielo hela kaj pensis:

— Ho! mi rezistu almenaŭ ĝis tagiĝo!

Unu post l'alia mallumis la steloj. Blankinjo pli forte kornobatis, la lupo pli kruele dento-ŝiris. Heliĝis la horizonto. Koka krio raŭke al-supris el farmejo.

— Fine! - diris la kompatinda, kiu nur atendis la tag-lumon por morti. Ĝi lasis sin teren, en sia bela felo sango-plena.

Tiam la lupo sin jetis al la kaprineto kaj formanĝis ĝin.



Ni daŭrigas publikigi tradukverkon de **Martin Ginette** [Saulxures/Moselotte, Francio] el la libro de Erik Orsenna "La gramatiko estas milda kanzono" (komenco en "K"-6-2002)

La Urbo de la Vortoj

Mi sciis nun, kaj por ĉiam, ke la vortoj estas vivantaj estaĵoj grupigitaj en triboj, ke ili meritas nian estimon, ke ili plenumas, se oni lasas ilin liberaj, vivon tiel riĉan kiel la nia, kun same granda ambezono, same granda kaŝita ribelforto, kaj pli da ĝoja fantazio.


La vortoj dormis. Ili sin metis sur la branĉojn de la arboj, kaj ne plu moviĝis. Ni milde marŝis sur la sablo, por ne vekti ilin. Stulte, mi pretigis miajn orelojn: mi tiom deziris ŝtelkapti iliajn songojn. Mi tiom ŝatus scii tion, kio pasas en la kapoj de la vortoj. Kompreneble, mi aŭdis nenion. Nur la obtuza tondro de la ondo-resalto, tie, malantaŭ la monteto. Kaj milda vento. Eble nur la spiro de la planedo Tero antaŭeniranta en la nokto. Ni proksimiĝis al la konstruaĵo, kiun malforte lumigis tremanteta ruĝa kruco.

— Jen la malsanulejo, - flustris mia kunulo.

Mi tremetadis. — Malsanulejo? Malsanulejo por la vortoj? — Mi ne sukcesis kredi tion. Honto invadis min. Io diris al mi, ke pri iliaj suferoj ni respondecas, ni la homoj. Oni povas kompari kun tiuj indianoj de Ameriko mortintaj pro malsanoj alportitaj de la eŭropaj konkerantoj.

Ekzistis neniu akceptejo, nek flegistoj en la malsanulejo por la vortoj. La koridoroj estis malplenaj. Nur gvidis nin la bluj lumetoj de la noktaj gardlampoj. Malgraŭ nia singardo, niaj ŝu-plandoj ĝemetis sur la planko.

Kvazaŭ responde, tre malforta bruo aŭdiĝis. Dufoje. Tre malforta ĝemo. Ĝi travenis sub unu el la pordoj, kiel letero, kiun oni ŝovas diskrete, por ne ĝeni.



Sadretdinova Naila [Voronej, Rusio]

Mia kunulo jetis al mi rapidan rigardon, kaj decidis eniri. Ĝi estis tie, senmova sur sia lito, la malgranda frazo bone konata, tro konata:

Mi vin amas.

Tri vortoj maldikaj kaj palaj, tiom blankaj. La naŭ literoj apenaŭ videblis sur la blanko de la lit-tukoj. Tri vortoj ligitaj po unu per plasta tubo al likvoplena bokalo...

Ŝajnis al mi, ke ĝi ridetis al ni, la malgranda frazo.

Ŝajnis ke ĝi nin alparolis:

— Mi estas iom laca. Kredeble mi tro laboris. Mi devas ripozi.

— Hej, hej. Mi vin amas, respondis mia kunulo, mi konas vin. Ekde kiam vi ekzistas. Vi estas solida. Kelkaj tagoj de ripozo, kaj vi denove staros.

Li lulis ĝin longtempe per ĉiuj mensogoj, kiujn oni rakontas al la malsanuloj. Sur la frunton de "Mi vin amas", li metis tualet-ganton akvumitan per freŝa akvo.

— Estas iom penige nokte. Tage, la aliaj vortoj venas kompanie al mi.

"Tom laca", "iom penige". "Mi vin amas" plendis nur duone. Ĝi aldonis "iom" al ĉiuj siaj frazoj.

— Ne plu parolu. Ripozu, vi tiom multe donis, reprenu fortojn, ni tiom bezonas vin.

Kaj li kantetis ĉe ĝia orelo la plej karesantan el ĉiuj siaj refrenoj.

— Venu nun. Ĝi dormas. Ni revenos morgaŭ.

Kompatinda "Mi vin amas". Ĉu ili sukcesos savi ĝin? Mia kunulo estis tiom emociigita kiom mi. Larmoj venis al mia gorgo, kiuj ne povis altenveni ĝis miaj okuloj. Ni portas en ni tro pezajn larmojn.

— ... Mi vin amas. Ĉiuj diras kaj ripetas: "Mi vin amas". Ĉu vi memoras pri la kontrakto? Ni devas arenti pri la vortoj. Ne ripeti ilin en ajna okazo. Nek uzi ilin mise, unujn anstataŭ la aliajn, rakontante mensogojn. Se ne, la vortoj eluziĝas. Kaj kelkfoje, estas tro malfrue por savi ilin.

Neelpensitaj historioj

Okazintaj *a/* aŭ tradukitaj *de* niaj legantoj

Osioka [Hirosimo, Japanio]

UK 2007 en Japanio

Hieraŭ mi trovis min en mia sonĝo inter la kongresanoj de UK 2007 en Japanio. Mi vestis min en belan jakon, kaj kun serioza mieno staris inter vi en solena malfermo. Do, mi estus la unua partoprenanto de la UK en Japanio.

Aloisio Sartorato [Rio de Janejro, Brazilo]

La homo, kiu nomiĝis Esperanto

Iam, en la okdekaj jaroj, mi konis homon, kiu nomiĝis “Esperanto”.

Mi estis parkumanta mian aŭtomobilon kaj tiam mi perceptis, ke iu taksio haltis proksime de mia veturilo. El ĝi eliris la ŝoforo, kiu sin direktis al mi. Estis vintro kaj la loko estis iom malluma. Mi timis, sed la homo tuj trankviligis min, dirante, ke li ne volus rabi min. Kaj li tuj demandis al mi:

— Ĉu vi nomiĝas Esperanto?

Kaj mi kompreneble respondis:

— Tute ne!!! Mi estas instruisto de Esperanto!

Kial vi demandas tion al mi?

Kaj li respondis:

— Ĉar mi mem nomiĝas Esperanto!

Kaj li prenis sian identigilon kaj montris al mi.

Kaj tie estis skribite: Esperanto Noblat Jr., filo de Esperanto Noblat.

Mi demandis:

— Ĉu vi estas esperantisto? Kaj la homo

respondis:

— Ne! (Fakte li estis simpla homo kaj tutcerte ne interesiĝis pri lernado de lingvoj).

— Sed kial vi nomiĝas Esperanto?

Kaj li aldonis:

— Mia avo elektis tiun nomon por mia patro kaj ĝi al li plaĉis, kaj siavice li nomis min Esperanto. Mi decidis alparoli vin, ĉar mi vidis sur la malantaŭa glaco de via aŭtomobilo tiun gluafişon ESPERANTO — LINGVO INTERNACIA, kaj pro tio mi pensis, ke vi ankaŭ nomiĝas Esperanto. Do, tiel mi konatiĝis kun la homo, kiu fakte nomiĝis “Esperanto”.

Verkis: Rinat Azamatov [Sibaj, Rusio].

Esperantigis **Manzurov Sergej** [Sibaj, Rusio]


Kata salono de beleco

De frua infanaĝo mi adoras animalojn. En mia hejmo loĝis flavruĝa kato Rijik.. Ĝi kaj mi estis samaĝuloj. Havante trijaran vivsperton, mi certe komprenis — animaloj estas tre malfeliĉaj, ne scipovante ŝanĝi koloron de sia felo por sin esprimi.

Mi decidis korekti tian maljustecon kaj transformi la flavruĝan melankolian katon en pasian brunulon. Bonŝance, salono de beleco por la kato troviĝis en nia domo. Mi malfermis pordeton de la forno kaj enŝovis tien la katon. Stulta besteto aktive malcedis, ne sciante ke ĝin atendas fabela aliaspektiĝo.

Post iom da tempo mi refoje malfermis la pordeton. Al mi rigardis du rondaj verdaj okuloj, en kiuj mi ial ne vidis ĝojon. Fulgonigra Rijik kugle forflugis el la forno kaj poste perdiĝis por du tagoj. Aŭ li fanfaronadis per sia belkolora felo, aŭ kaŝiĝis de sia stilisto. Hejme la kato aperis ree estante flavruĝa kaj mi ripetis procezon de lia beligo... t.e. nigriĝo. La proceduro ĉesis kun komenco de hejtsezono.

Nun mi havas 11 jarojn. Niaj familianoj ĝis nun memoras katan salonon de beleco kaj ĝian solan klienton — Rijik!



Bill Thorne [Londono, Britio]

Aforismo estas novelo, el kiu redaktoro forstrekis ĉion superfluan.

AFO[☹]RISMO[☺]J

**Jader Rodrigues
da Silva**

[Belo Horizonte,
Brazilo]

En via hejma intimeco
Ne forgesu
pri l'estonteco:
Infano edukota
Estas mondo
konstruota.

Johano de Dio


Zujeva Margarita
[Moskvo, Rusio]

Distingu inter viaj amikoj bonajn kaj
malbonajn kaj estu amiko kun tiaj kaj
kun la aliaj.

Kiam homo rerigardas malantaŭen,
multon li vidas kun klareco, proksima
al mirego.

Ĉiu, kiu kapablas kulturi du spikojn de
tritiko sur tiu loko, kie pli frue kreskis
nur unu, meritas superan laŭdon de
homaro. Por sia lando li faras pli mul-
te, ol ĉiuj politikistoj kune prenitaj.

Ĝonatan Svift.



Jabina Olga [Čelabinsk, Rusio]

Inteligenta estro plus inteligenta laboristo estas PROFITO.
Inteligenta estro plus stulta laboristo estas PRODUKTADO.
Stulta estro plus inteligenta laboristo estas PROMOCIO.
Stulta estro plus stulta laboristo estas ALDONAJ LABORHOROJ.

Pri gazetoj kaj ĵurnalistoj...

Gazeto kutimigas la legantojn cer-
bumi pri tio, kion ili ne scias, kaj
scii tion, kion ili ne komprenas.

Vasilij Kluchevskij,

*

Se oni devigus elekti inter registaro
sen gazetoj kaj gazetoj sen registaro,
mi certe elektus la duan.

Tomas Ĝeferson

*

Neniam aperigu en la gazeto tion,
kion ne povas kompreni via hejma
servistino.

Ĝozef Pulitzer

*

Ĵurnalistiko — tio estas kiam oni
anoncas, ke "Lord Ĝon mortis" al la
homoj, kiuj ne scias, ke "Lord Ĝon"
vivas.

Gilbert Ĉisterton

*

Pri la hela estonto zorgas politikis-
toj, prila hela pasinto zorgas histo-
riistoj, kaj pri la hela nuntempo —
ĵurnalistoj.

Ĵarko Petan

*

La amaskomunikiloj bonas almenaŭ
pro tio, ke ili instruas nin ne kredi
al amaskomunikiloj.

Semuel Batler

*

Mi malpacience atendas la kapar-
tikolon, kiu komenciĝus per la
vortoj: "En niaj gajaj tempoj..."

Gabriel Laub

*

La kvanto de la reejoj de la legan-
toj estas malproportia al la graveco
de la diskutata temo.

Robert Markus

*

La granda titolo de la artikolo faras
ajnan novaĵon granda.

NN

*

Legu nur la malnovajn gazetojn.
Post dek jaroj ĉiuj malbonaj novaĵoj
ŝajnos ridindaj.

Jean Anuj



Inter viroj kaj virinoj

Saĝa viro + saĝa virino = amafero.
 Saĝa viro + malsaĝa virino = flirto.
 Malsaĝa viro + saĝa virino = geedziĝo.
 Malsaĝa viro + malsaĝa ino = grave-diĝo.

*

— Ĉu mi estas la unua viro, kiun vi iam amis?
 — Kompreneble. Sed por mi estas interese, kial ĉiuj viroj ĉiam demandas la samon?

*

Virino dum 10 jaroj penegas por ŝanĝi la kutimojn kaj trajtojn de karaktero de sia edzo, kaj poste ŝi plendas, ke li ne plu estas tiu homo, al kiu ŝi edziniĝis antaŭ 10 jaroj...

*

— Ho, karuĉjo, - diras la junedzino al sia junedzo, - nur pensu! Ni geedziĝis antaŭ nur dudek kvar horoj!
 — Jes, karinjo, - respondas la junedzo al la junedzino, - estas nekredeble. Kaj ŝajnas, kvazaŭ tio estis nur hieraŭ!

Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

— Vi havas tiom feliĉan familion, en kio estas ĝia sekreto?
 — En tio, ke dum ajna konflikto la lastajn vortojn mi lasas por mi.
 — Kaj kiaj estas tiuj vortoj?
 — Vi pravas, kara mia.

*

Paĉjo, mi decidis edziĝi.
 — Bonvolu, fileto. Sed tiu paŝo estas tre serioza. Ja familio anstataŭas al homo ĉion. Antaŭ ol fari tiun paŝon bonvolu decidi, kio por vi pli gravas — familio aŭ ĉio.

Fukalov Aleksej [Solikamsk, Rusio]

Francino plendas al sia amikino:
 — Dum lastaj kvin jaroj Jak al mi jam ne plu rigardas. Mi timas, ke okazu al mi io... li eĉ la korpon ne povos identigi...

Inter komputilistoj

La kompanio "Intel" post la sukcesa produktado de la procesiloj Pentium-1, P-2, P-3 kaj Pentium-4 decidis produkti procesilojn "La reveno de Pentium".

*

Du programistoj babilas:
 — Hieraŭ mia konato rompis la servilon.
 — Ĉu li estas hakero?
 — Ne, li estas idioto.

Vanjukova Nadejda [Pikuzino, Rusio]

— Bokso estas bona sporto. Dank'al bokso mi multan monon gajnas.
 — Ĉu vi estas granda boksisto?
 — Ne, mi estas kuracisto.

Pri la utilo de afiŝoj

La viro legas afiŝon:
La ponto disfalis, se du viroj pasos sur ĝin
 La viro pasis kaj la ponto disfalis. Kial?
 Ĉar unu viroj informitaj valoras du virojn.

*


En la gardero de iu oficejo pendis kelkaj vest-arkoj kun la ŝildoj:

Nur por direktoroj
 Iun tagon iu aldonis slipeton:
Taŭgas ankaŭ por manteloj

Trinku ni po glaso...

Pingveno eniras drinkejon:
 — Donu al mi duoblan viskion.
 La vendisto, embarasita, iras al sia ĉefo kaj rakontas la situacion. La ĉefo diras:
 — Prenu de li 20 eŭrojn!
 La vendisto tiel faris. La pingveno pagis kaj trankvile stariĝis apude, trinkante sian viskion. La vendisto, daŭre embarasita, sed scivolema, tamen kuragiĝis demandi:
 — Fakte, ne ofte pingvenoj vizitas nian drinkejon!
 La pingveno respondas:
 — Ili tute ne vizitos vin, se vi pagigos ilin po 20 eŭroj por ĉiu duobla viskio.

Petrov Eugeno [Magnitogorsk, Rusio]




Sidas en la ŝranko du tineoj, panjo kaj filino, manĝas lanan palton. La filino demandas:
 — Panjo, mi volas flugi...
 — Ne, sidu kaj manĝu!
 — Nu, kial? Hieraŭ mi flugis, kaj mi al mi estis tiom da aplaŭdoj!

Du amikoj babilas

Du amikoj babilas. La unua fanfaronas:
 - Mi estas vera gravulo: mi havas pli ol mil personojn sub mi!
 La dua: - Normale. Vi estas ĝardenisto en tombejo!

*

Du amikoj babilas.
 - Kial vi tiel ŝatas viziti futbalon?
 - Mi ne scias, evidente, kitimiĝis...
 - Sed mi scias! Hejme al mi kriacias la edzino, en la oficejo - la ĉefo. ... sed en la futbalo - mi kriacias al ĉiuj!



Diversaj ondoj de bunta mondo

Karaj legantoj! Jen la nova rubriko, kie vi povas prezenti kutimojn, morojn, tradiciojn de via lando aŭ regiono; popolajn kantojn, fabelojn, proverbojn; viajn ŝatatajn naciajn manĝaĵojn, bildojn de naciaj kostumoj kun priskriboj, do, ĉion, kio helpas malkovri riĉecon de la mondo. Ni lanĉas la rubrikon per popola kanto, kiun sendis nia leganto el Italio A. Gambuti kaj per recepto de D. Kaiser el Germanio.

Esperantigis: **Antonio Gambuti**
[Savignano sul Rubicone, Italio]

Romanja mia

Sentas mi nostalgion pri paseo
kie la panjo mia restis vee!
Mi ne forgesos vin, dometo mia.
En ĉi-plenstela noktado
jen mia serenado
leviĝas por vi.

Romanja mia, Romanja adore,
vi estas amo, mi kantas kore.
Pri vi pensante, mi flugus lare
ĉe l' amatinon, for enkamparen.
Romanja, Romanja mia,
lontana vi, nur plor-amar'.

N.B.

"Romanja mia" estas kanto de mia regioneto, sed estas tre konata en tuta Italio kaj ankaŭ eksterlande, ĉar estas valso tre ludata en mia regiono, kien alvenas turistoj el la tuta Eŭropo por somerumo. En mia traduko mi klopodis speguligi la italan tekston ĉefe ĉe la rimoj. Tiel se italo aŭdas kanti ĝin en Esperanto li tuj rekonas la melodion de la amata kanto.

Valzer

STROFA
SENTAS MI NOSTAL-GI-ON PRI PA-SE-O...
KI-E LA PA-NJO MI-A RE-STIS VE-E...
MI NE FOR-GE-SOS VIN DO-ME-TO MI-A... EN ĈI-PL-EN-ST-ELA NOKT-ADO
JEN MIA SE-R-EN-A-DO LE-VI-Ĝ-AS POR VI... ROMAN-JA MIA

RITORNELLO
MI-A ROMAN-JA-A-DO-RE... VI ES-TAS A-MO... MI
KAN-TAS AD-RE... PRI VI-PEN-SAN-TE MI EN-SO-SIA-RE...
L'A-MIA-TI... FOR EN-KAM-PA-REN... ROMAN-JA
ROMAN-JA MIA... LON-TA-NA VI... NUR PLOR-A-

MAR' ROMAN-JA

Fine

Dorothea Kaiser
[Altenburg, Germanio]

Spagetoj kun tomatosaŭco por kvar personoj

Ingrediencoj por la spagetoj:

500g da spagetoj, 2 supkuleroj da butero, 1 kulereto da salo, raspita fromaĝo

Ingrediencoj por la tomatosaŭco:


1 cepo, 1 ajlbulbero, 3 supkuleroj da olivoleo, 1 kg da maturaj tomatoj aŭ konservujon kun ŝeltomatoj, 1 kulereto da bazilio, salo, pipro

Preparoj de la tomatosaŭco:

1. Brezu la cepon kaj la ajlbulberon en olivoleo.
2. Aldonu la tomatojn kaj kuiru ĉion dum kelkaj sekundoj.
3. Stufetu per milda fajro dum 45 minutoj.
4. Verŝu ĉion tra kribrilo kaj spicu per bazilio, salo kaj pipro.
5. Stufetu plu sur milda fajro ankoraŭ 10 minutojn.

Preparoj de la spagetoj:

1. Ŝutu la spagetojn en grandan poton kun 4 ĝis 5 litroj da salita bolanta akvo kaj tuj iomete tummovu ilin.
2. Plu kuiru la spagetojn per meza fajro kaj de tempo al tempo tummovu ilin.
3. Ŝutu la spagetojn post 8 ĝis 10 minutoj en grandan kribrilon kaj lasu traflui la akvon.
4. Metu 2 supkuleron da butero en la ankoraux varmegan poton, enmetu la spagetojn kaj miksu ĉion.
5. Metu la varmegajn spagetojn sur profundan teleron kaj aldonu la tomatosaŭcon kaj la raspitan fromaĝon.



Invitoj kaj informoj

Pola Radio en Esperanto

Elsendas en Esperanto kvar fojojn tage je la 9.30, 16.00, 19.00, 20.00 laŭ la Universala Tempo.

Krom konstantaj eroj en la elsendoj aŭdiĝas redakciaj interparoloj pri aktualaj temoj, sonraportoj, telefonaj interparoloj pri gravaj polaj kaj internaciaj temoj. En la elsendoj multe da atento oni donas al la lokoj ligitaj kun la agado de la kreinto de Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof.

Pola Radio disvastigas en Esperanto kvar fojojn tage la samenhavan elsendon (laŭ UTC)

9.30 h - nur per satelito

16.00 h - 41.26 m = 7270 kHz (la premiera elsendo)

19.00 h - 41.18 m = 7285 kHz

20.00 h - nur per satelito

Konstantaj eroj de la semajna programo

Leterkesto

Havas la formon de interparolo pri la temoj traktitaj en la korespondaĵoj de niaj aŭskultantoj; aŭdiĝas en ĝi respondoj je konkretaj demandoj en la ciklo "Spure de la leteroj", interparoloj kun geaŭskultantoj; estas priparolataj problemoj de la aŭdebleco. Leterkesto estas ankaŭ forumo por interŝanĝo de salutmesaĝoj inter aŭskultantoj

Dimanĉe: 16.00, 19.00, 20.00 kaj lunde: 9.30

Kultura magazino

Prezentas la kulturalan vivon en la lando, prezentas kreantojn de la pola kulturo kaj internacian kunlaboron kulturalan de Pollando.

Ĵaŭde: 16.00, 19.00, 20.00 kaj vendrede: 9.30

Homoj kaj problemoj

Varitemaj interparoloj pri interesvekaj problemoj, ligitaj ekz. kun la internacia komunikado, lingvaj rajtoj, originala Esperanto literaturo de poloj kaj eksterlandanoj, sciencaj esploroj pri Esperanto.

Vendrede: 16.00, 19.00, 20.00 kaj sabate: 9.30

Pollando hodiaŭ

Soci-familia magazino pritraktas vaste komprenatan temaron familian, socian kun la konsidero de la problemoj de la pola klerigo, polaj minoritatoj ktp.

Merkrede: 16.00, 19.00, 20.00 kaj ĵaŭde: 9.30

Trarigardo de la Esperanto-gazetaro


Prezentas pri kio skribas polaj kaj eksterlandaj gazetoj aperantaj en la lingvo Esperanto, kun aparta konsidero de polaj temoj, popularigado de la elsendoj en la monda Esperanto-gazetaro.

Marde: 16.00, 19.00, 20.00 kaj merkrede 9.30

Esperanto-ekspreso

Bunte prezentas eventojn en la pola kaj internacia Esperanto movado, enhavas interparolojn kun aktivuloj, sonraportojn pri la polaj kaj internaciaj esperantistaj aranĝoj.

Sabate: 16.00, 19.00, 20.00 kaj dimanĉe: 9.30



Gazetaraj Komunikoj

Nova Fondajo ĉe UEA: EDUKADO

La estraro de UEA ĵus voĉdonis por starigi novan fondaĵon, kies nomo klarigas ties funkcion: EDUKADO.

Ĝi estas fondaĵo por kolekti financan subtenon por la kampo de Edukado/Instruado. Ĝis nun la instruado de Esperanto (unu el la prioritatoj de la nun valida labor-plano) estis subtenata esence de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ILEI, per sia negranda buĝeto kaj per la helpo, kiun UEA donis ĉiujare al ILEI el sia propra buĝeto.

Nun individuaj esperantistoj, kiuj opinias, ke gravas instruado de Esperanto kaj pli ĝenerale edukado pri Esperanto, havas plian eblecon direkti sian helpon al la ĝusta loko.

Kiel pri aliaj fondaĵoj oni povas indiki ke oni deziras, ke la donaco eniru la Kapitalon Edukado. En tiu kazo nur la rento estos uzata por elspezoj, dum la kapitalo restos por doni renton ankaŭ en postaj jaroj.

Nun, kiam ILEI provas lanĉi la duan periodon de la internacia instrua projekto INTERKULTURO, estas evidente, ke helpo (almenaŭ en la formo de lemolibroj por lernantoj en landoj je malforta ekonomia nivelo) estas ege necesa.

Oni povas donaci per la kutimaj konto de UEA kun la indiko "por Fondaĵo Edukado" aŭ "por Kapitalo Edukado"

Renato Corsetti — prezidanto de UEA

Mauro La Torre — prezidanto de ILEI

Enketado pri la Delegita Reto

Fine de decembro 2002 al entute 871 rete atingeblaj delegitoj de 75 landoj, kies nomoj estis publikigitaj en Jarlibro 2001, estis dissendita enketilo kun la peto respondi, ĉu iu petis ilin pri la servoj en la periodo inter publikigoj de Jarlibro 2001 kaj 2002 (mezo de somero 2001 kaj septembro 2002).

Malgraŭ jarŝanĝaj festoj la delegitoj aktive reeĥis kaj sume ĝis la 21-a de januaro 2003 al la enketo respondis 455 delegitoj de 65 landoj.

Montriĝis, ke jes estis petitaj servoj de 244 (54%) delegitoj, dum 179 (39%) delegitoj neniam ricevis petojn por iliaj delegitaj servoj. 32 (7%) delegitoj ne certas, ĉu la ricevitaj petoj rilatas al ilia delegiteco aŭ venis per aliaj kanaloj.

La delegitoj, menciintaj ciferojn, ricevis kaj plenumis 418 informpetojn pri siaj lando aŭ urbo, 653-foje peris informojn pri lokaj e-istoj kaj E-grupoj, 488-foje estis kontaktitaj fakcele, kio sume signifas 1559 servojn.

Krom tio, kutime ekster siaj delegitaj devoj, ili ricevis 256-foje petojn pri gastigado, 495-foje - korespondpetojn, minimume 342-foje alispecajn petojn (de simple neordinaraj ĝis monpetadoj).

Pli detale pri la rezultoj vi povas legi en la retejo "uea.org" - en la parto "Servoj" aŭ iam baldaŭ - en la revuo Esperanto.

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

37 jara fraŭlo, komencanto:
kulturo, sporto, muziko, legado,
kolekti poŝt-markojn-kartojn,
monerojn, pref. paper-poŝton.

*Luiz Correia Bernardes
Filho*

Rua Catete, 35
Barroca
Belo Horizonte, MG
CEP: 30430-520

Brazilo

lobf.bhz @ terra.com.br

Mi estas 48-jara, studas
beletnistikon kaj ĵurnalismen en
akademio de Hamburgo. Mi
estas esperantisto jam de multaj
jaroj. Intereso: literaturo, poezio,
tradukado, amikeco, vojaĝado,
muziko de Chopin, J. S. Bach,
popolmuziko de Latin-Ameriko,
gastigado de Esperantistoj.

*Hans-Georg KAISER
Wenzelstr. 12*

DE- 04600 Altenburg

Germanio

kaiser-altenburg@t-online.de

Mi estas 42 jara viro, kom-
encanto. Mi estas komerca
inĝeniero. Int: homa inter-
komunikado, lingvoj, kino,
muziko, pentrarto. Bv uzi ret-
poŝton kaj paper-poŝton.

*Pascal REBOURS
2, allée des biches
78170 la Celle Saint Cloud*

Francio

scalp724@aol.com

Mi estas 32-jara virino el Oslo,
Int: legado, lingvoj, vojaĝado,
historio kaj astronomio. Mi ŝatus
renkonti miajn korespondantojn
dum miaj vojaĝoj.


*Charlotte W. Jensen
Fagerheimsgt 22
0475 Oslo*

Norvegio

nemi31@yahoo.com

Ni loĝas en Svislando. Ni parolas france. Nia lernejo estas neŝtata
lernejo. En ĝi estas: unu grupo komencanta, unu grupo progresanta
(ĉiuj aĝoj), unu grupo estas sufiĉe lerta. En lute estas 19 gelemantoj
de la 6-a je la 13-a. Ni serĉas grupojn, kiuj povus interŝanĝi ofte rete
kun niaj gelemantoj. <grande-ourse1@swissonline.ch>

*Véra Zaslavsky, Ecole de La Grande Ourse,
La Chaŭ-de-Fonds, Svislando*



Bill Thome [Londono, Britio]

Legu "Komencanton" kaj verku mem !

KOMENCANTO

2003

16 paĝoj

kolora kovrilo

famaj esperantistoj
historio de E-literaturo
gramatiko serioze kaj ŝerce
neelpensitaj historioj
amuzaj rakontoj
proverboj, enigmoj
aforismoj, anekdotoj
anoncetoj, adresoj
multaj multaj bildoj

Mi estas viro 40 jara. Mi
estas lingvo-instruisto

Cui Jiayou

P. O. Kesto 448,
Lixin158120,
Jixi, Heilongjiang,

Ĉinio

amikeco@sina.com

Mi estas 22 jara viro.
Intereso:
muziko, vojaĝoj, amikeco.

*Ajit Joshi
Kathmandu,
Nepalo*

ajit_aas@hotmail.com

Mi estas 35 jara, kaj mi estas
komencanta esperantisto. Mi
loĝas en St. Paul, la ĉefurbo
de Minnesota, en Usono. Mi
estas edzo, kaj mi loĝas kun
mia edzino kaj niaj du katoj.
Miaj intereso estas kantado,
muziko, novaj amikoj, kaj
lerni pri homoj de aliaj landoj.
Mi preferas paper-poŝton.

*Mark DIETRICH
1530 Grotto St. N.
St. Paul, MN 55117*

Usono / USA

josquin88@earthlink.net

Kun Anglio, Hispanio,
Portugallio pri vojaĝoj,
kuirartoj ktp.

*Jevdokimova Olga - 17 ja
Liĥáčova Olga - 16 ja
"Esperanto-klubo"*

Lenina, 181
Rybinsk — 7
Jaroslavskaja obl.,
152907

Rusio

Bonvolu noti novan retroŝtan adreson de KOMENCANTO

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj !

